

Numero: 241.
Junio: 2012.

20-a jarkolekto

LITERATURA FOLIO

VESPERTO



Redaktanto:
Apáti Kovács Béla
Kaposvár
Béla király u. 44.
H-7400 HUNGARIO
Telefona: 82/ 410-664
Retadreso: espBELA@t-online.hu
Eldonanto: Kaposvara Esperanto Centro
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

Somero

Ĉiu tre atendas la someron. En tiu ĉi sezono oni fartas agrable, ĝuas la karesadon de la karaj sunradioj.

Antaŭ ni estas la vasta, verda kampo, kie mil kaj mil floroj pompas.

Promeni marborde en velura sablo forgesiĝante pri la bruoj de la mondo.

Nur ni estas kaj la naturo. Ni ambaŭ estas la parto de la universo, kie milionoj, eĉ miliardoj da steloj kaŝas vivon.

Tamen la nia estas la plej bela. Ni gardu ĝin ame kaj ni estimu la tuton.

Somero gajigas nin kaj donas esperon.

Freŝa venteto kisas nin kaj ni ekkrias, kiel infano.

Homamasoj ekiras malkovri la mondon, kaj renkonti aliuloj. Ili traveturas kontinentojn admirante malproksimajn regionojn.

Dume ili vole - nevole komunikas kun homoj parolantaj diversajn lingvojn.

Estas vera lingva ĥaoso ĉie, kaj la voĵagantoj ne komprenas unu la alian.

Ĉiufoje dum la eksterlandaj vojaĝoj ni decidas lerni fremdajn lingvojn.

Sed kiujn? Tio estas la granda demando.

Kiu scias la respondon? Kiu estas la plej utila lingvo?

Certe nun multaj ĥore respondas: Oni devas lerni la anglan. Tiu ĉi lingvo jam estas disvastiĝinta en la tuta mondo.

Ĉu vere ĝi estas la plej utila lingvo?

Neniu asertas, ke per la angla lingvo oni ne povas komuniki. Sed ankaŭ la angla estas nur lingvo, kiel la aliaj.

La mondo bezonas neŭtralan lingvon, per kiu oni facile kaj senĝene povas ekparoli kun eksterlandano.

Estus bela mondo, se la homaro havus komunan lingvon internacian.

Baldaŭe ni devos elekti tian lingvon, ĉar la homaro droniĝos en la maron de la lingvoj.

Agu, ke la somerumado estu agrabla ankaŭ eksterlande.

-Redaktanto -



Fremdlingvo

Mi ĉagreniĝis antaŭ nelonge ekvidante fremdlingvan tekston surstrate.

Nun ne gravas kio estis skribita sur la afiŝon. Plurloke oni vidas tiajn. Kvazaŭ ni ne estus en Hungario.

Kion deziras mesaĝi al ni tiaj afiŝoj? Mi serĉas la respondon. Bedaŭrinde neniu povas klarigi al mi kaj al multaj samlandanoj, kiuj renkontas ilin promenante sur la strato.

Ĉu oni opinias, se la nomo de la programo estas skribita en iu fremda lingvo, tiam ĝi estos interesa? Eble oni pensas, la fremdlingva titolo tiregas la eksterlandanojn?

Se jes, ĉu ĉiu eksterlandano perfekte parolas tiun modlingvon?

Mi skribis modlingvo, ĉar laŭ mi la nuna estas tiel, kiel komence de la dudeka jarcento la franca. Tiutempe ĉiu klera homo lernis la francan lingvon.

Jardekoj, jarcentoj venas kaj foriras kaj tiel ŝanĝiĝas ankaŭ la uzo de iu lingvo vaste disvastiĝanta tra la tuta mondo. Tio dependas de la tiama politika situacio. De kie ventas la politiko.

Ĉiu scias, la olda Eŭropo kaj al ĝi kroĉiĝanta okcidenta mondo knaradas. Eble venteto sufiĉas forblovi ĉi mondsistemon, kaj anstataŭ venos nova ĝis nun nekonata.

Ne diru, ke ĝi estas neimagebla. Dum jarcentoj, eĉ jarmiloj jam okazis multaj strangaj aferoj. Eble morgaŭ ne ekzistos plu la nuna, pri kiu ni pensis, ke ĝi estas perfekta.

En la nova mondsistemo naskiĝos lingvoj, kiu plenis ĉi tiun rolon.

La fremdlingva teksto de la afiŝo estas nur momenta fenomeno, fanfarado de homgrupoj, kiu pensas: ili povas kompreni sin en tiu fremda lingvo.

Se ili vere scius ĝin, tiam komprenus ĉiu lingvo estas egalrajta kaj vana laboro klopodi superi nian lingvon per alia.

Ne hontinde ekparoli hungare kaj allogi homojn per nia belega nacia lingvo.

-Ŝaŝa-



Somera vespero

Nun mi rakontas al vi veran romancon pri junulino kaj junulo.

Ili vivis en Esperantujo. Ilia romano komenciĝis en iu somera vespero. Ne gravas kiam. Tio povintus komenciĝi ankaŭ en la fora, nebula pratempo aŭ nuntempe. Ĝenerale la amoj similas unu la alia, sed tamen ili ege diferencas.

Se tiu fajro bruligas la homan koron de tio neebala rifuĝi. La bruligoj flagras prilumante la horizonton per akra lumo.

La junulino sidis en la ĝardeno kaj revadis. Ŝi rigardis la ĉielon kaj Dio scias pri kio ŝi pensis.

La vetero estis agrabla. Jam forpasis la varmegaj horoj. Malvarmeta venteto ekkaresis ŝian vizaĝon, kiel patrino sian infanon.

Estis bone sidi en la ĝardeno kaj fari nenion.

En la alia parto de la urbo junulo rapidis hejmen. Li estis sola kaj iom malbonhumora. Efektive ankaŭ li ne komprenis, kio estas tiu ĉi tristeco. Indiferente paŝadis sur la varma asfaltotroturo, kiu ankoraŭ nun radiis la posttagmezan varmegon.



Nur kelkaj homoj venis kontraŭ li sur la strato. Ili promenis en la vespera urbo. El ili neniun li konis, kvazaŭ li estus fremdulo en sia urbo.

Li ĝojis, ke li ne devos halti kaj babili kun konatuloj. Ankoraŭ kvin minutoj kaj li estos hejme. Hodiaŭ li enlitiĝos frue. En la lastaj tagoj li ĉiufoje alvenis hejmen post la noktomezo.

La junulino havis hundeton kaj la petola besto serĉis truon sur la barilo. Ĝi deziris eligi tie, kaj ekiri en la nokta mondo por serĉi hundoknabinon.

La truo estis tro malgranda kaj la malfeliĉa hundeto ne povis liberigi sin. Malgaje vinzis kaj per siaj grandaj okuloj petis helpo de la preteriranto.

Li kompatis la besteton kaj li liberigis ĝin. En liaj manoj estis la tremanta hundo,

Nun kion fari? Ĉu li lasu forkuri ĝin aŭ li sonorigu por la dommastro? Fine li elektis la lastan.

Li longe sonorigis ĉe la pordego ĝis la junulino ekaŭdis ĝin,

--Kiu alvenis? -- ŝi demandis mire -- Mi atendas neniun.

Ŝi ekstaris kaj iris al la pordego. Surstrate la konturoj de viro vidiĝis. Tiam ankoraŭ ŝi ne vidis la hundeton.

--Fraulino, - ekparolis la junulo -- bonan vesperon. Via hundeto estis kaptita pere de barilo kaj mi liberigis ĝin.

La junulino kuris al la pordego kaj ekkriis:

--Bukŝi×! Ĉu vi denove volis formigri? Malbona besto! Ĉiam vi kaŭzas al mi malĝojon. Sinjoro, dankegon pro la helpo. Mi estas tre tre dankema.

Li singardeme transdonis la tremantan hundeton. Tiam iliaj manoj tuŝis unu la alian. Li sentis la veluran haŭton de la junulino. Kvazaŭ kurento trakuregus lian korpon. Ankoraŭ li nenian sentis tian.

Ŝajne ankaŭ la junulino ektemetis. Malgraŭ tio, ke estis malhelo, ŝi ekvidis etan flamon en liaj okuloj, kiu trafis ŝian koron. Efektive ŝi ne sciis, kio? Pleje ŝi forkurintus. Sed ŝi restis tie mute prenante forte la formigrintan hundeton.

Ili ambaŭ sentis post la transdono de la hundo, ili devus disiĝi. Io ne lasis fini tiun ĉi hazardan renkontiĝon. Ili nur staris senmove kaj silentis. Fine la junulo diris:

--Mi devas iri, ĉar morgaŭ frumatene mi eklaboros.

--Mi tre dankegas ankoraŭfoje flustris la junulino. Espereble Bukŝi plurfoje ne povos formigri. Mi petas mian patron por ke li riparu la barilon -- balbutis mallaŭte la junulino -- Bonan nokton!

En tiu momento la koro de la junulo rapide ekpulis kaj kiel la akvodronanto ekprenante la lastan branĉeton li diris al la junulino:

--Se vi deziras, morgaŭ mi riparos la barilon.

Sekvis longa silento. La junulino ne sciis, kion respondi. Ŝi nur ridetis kaj forte brakumis la hundeton.

--Ĉu vi ne volas? -- li demandis iom malgaje, kiel tiu, kiu jam scias la respondo.

--Mia paĉjo povas fari ĉion -- ŝi diris fine -- sed mi tre dankas.

La junulo ruiniĝis. Ankaŭ la lasta espero forflugis. Baldaŭe li devos ekiri. Kial resti tie ĉi ĉe la pordego de fremdulino malfruvespere.

--Nu mi iras, kiel dirinte morgaŭ matene mi devos labori. Bonan nokton! Adiaŭ!

La junulino ne atendis tian subitan foriron. Ŝi volis diri ion, sed voĉo ne forlasis ŝian buŝon.

--Ankaŭ en la nomo de Bukŝi mi dankegas Vian helpo.

--Nedankkinde -- li respondis malgaje kaj ekiris kun klinita kapo hejmen.

La junulino triste rigardis post lin kaj senvoĉe ŝi diris por si:

--Mi estas azeno. Mi lasis lin foriri.

× *Bukŝi hundonomo en Hungario*

-Apáti Kovács Béla-



Poezio

Poemoj de Cezar

Abelaj instruoj

Se Abel' nin krude pikas,
tio ja ne nur tragikas.
La abelo nin indikas,
ke plu vivo en ni ŝrikas.

Kaj mortante la abelo
montras nin kun vera belo,
ke sindon' por granda celo
estas pli ol nur fabelo.

La blua feministino

Pace pendas
"La blua feministino"
en verda kadro
sur la protestvando.
Ĉu vere pace?

Ĉu neniu volas ŝteli
aŭ gratdifekti la bildon?
Kia stranga ideo!
Voli ŝteli aŭ gratdifekti
la bluan pentraĵon.

Tiu ĉi bildo,
kiu iom oblikve pendas,
memoras min iomete pri vi,
mia kara!



Poezio

Bonan matenon, belulino!

Bonan matenon, fiera belulino.
Donu al mi, se eblas, kiseton.
Ridetu almenaŭ iomete,
se tio ne plu estas
postulo troa por vi,
kvankam mi tiom kruele
vundis vian tumultantan koron.

Bonan matenon, fiera belulino.
Kiel anĝelo de venĝo
vi puŝis vian tranĉilon
el kolero kaj furiozo
en mian ŝtoniĝintan koron.
Rigardu, kiom mi suferas pro ĝi!

Bonan matenon, belulino.
Ne plu militu kontraŭ mi.
Surgenu mi petas vin!
Mi ja jam lernis la lecionon.
Mi ja jam subskribis la pacan kontrakton.
Mi nun plena de pento akceptas, ke ankaŭ mi
estas nur homo, kaj ne dio, kiel mi supozis orgojle.

Bonan matenon, fiera belulino!
Mi malfermas la ruĝan fenestron por vi!
Rigardu, la ŝtormo enblovas, la mevoj krias,
hej belulino, venu do, ekstaru finfine,
mia kara "Ne-tuŝu-min!"
Ni havas taskojn.
Ni batalu!
Por ni mem, fiera belulino!
Kaj por ĉiuj aliaj!!



Por infanoj

La pomo de reĝidino

Kaj estis, kaj ne estis, antaŭlonge trans la Fabeloceano vivis maljuna reĝo kaj li havis belegan filineton.

Li deziris edzinigi la reĝidino, ĉar alvenis la tempo. Sed la belega reĝidino estis tre elektema. Neniu kandidato plaĉis al ŝi. Kvankam ĉiutage venis multaj junaj princoj, grafoj kaj grandsinjoroj.

Ĉiujfoje ŝi malgaje diris al sia patro:

--Paĉjo mia, ili ne plaĉas al mi.

Aŭdante tion la reĝo ekkoleriĝis, kaj ordonis al la reĝidino:

--Morgaŭ kiu venos la unua, vi edziniĝos al li. Mi jam estas maljuna, kaj mi devas serĉi por vi amantan edzon kaj konvenan junulon, kiu sekvos min sur la trono.

La reĝidino diris nenion. Ŝi reiris al sia ĉambro, kie ŝi trovis sur la tablo belan, ruĝan pomon.

Ŝi tuj enmordis, ĉar jam delonge ŝi ne vidis tiel belan frukton. Certe servisto portis ĝin al ŝi.

Ŝi eklevis la pomon al sia buŝo, kiam malgranda hometo elsaltis el ĝi.

--Ne manĝu min! – li diris – Mi estas la loĝanto de tiu ĉi pomo kaj se vi lasos mian vivon, mi edziniĝos vin.

Tio ĉi ege surprizis la reĝidino. Kiam ŝi rekonsciiĝis el la miro, demandis:

--Ĉu vi deziras edzinigi min? Ja vi estas pli malgranda ol muŝo.

Se vi sekvas miajn konsilojn, tiam vi estos la plej feliĉa virino en la tuta mondo.

La reĝidino kredis, ne kredis al la hometo, sed fine ŝi akceptis lian proponon.

--Iru al via patro kaj diru: morgaŭ, kiu enpaŝos la unua en la palacon, estu li kio ajn, vi edziniĝos al li. Ĉu bone?

Ŝi promesis, ke ŝi faros ĉion tiel, kiel la hometo proponis al ŝi.

La reĝo tre miris, ke la reĝidino tiom ŝanĝiĝis kaj jam ŝi ne kontraŭas la geedziĝon. Apenaŭ li atendis la matenon, kiam enpaŝos la palacon bela kavaliro, kaj edziniĝos lian filineton.

Alvenis la mateno. Longe oni devis atendi ĝis ekaperis la unua fianĉokandidato. Sed kiam la reĝo ekvidis la alvenanton, preskaŭ svenis pro la miro.

Li estis mem la hometo, sed li estis tiom malbela, ke ankaŭ sia patrino ne rekonis lin.

--Mi deziras edzinigi la reĝidino – li diris aplombe.

La reĝo jam ĝuste volis diri, ke la reĝidino li ne donas al aĉulo, sed li ekmemoris pri sia promeso.

--Bone – li diris - se ankaŭ mia filino deziras.

La reĝo turnis sin al sia filineto kaj demandis esperante, ke ankaŭ ŝi rifuzos de la fianĉokandidato.

Sed la reĝidino akceptis la geedzigan proponon, eĉ ŝi ĝojege kuris al la hometo.

--Kun ĝojo mi akceptas vian geedzigan proponon kara mia bravulo .Jam delonge mi atendas je tiu ĉi belega tago.

La reĝon surprizis la neatendita parolo kaj malgaje benis ilin.

--Estu laŭ via volo! – li diris malgaje.

Baldaŭe ĉiu febre prepariĝis al la geedza ceremonio.

Nur la maljuna reĝo ne estis kontenta. Li ne volis akcepti, ke la hometo estu la edzo de lia filineto. Ruze li turnis sin al la fianĉo:

--Kio estu la ceremonia tagmanĝo bofilo mia? Kion vi deziras manĝi?

--Mi pleje manĝus grandan torton farita el freŝaj pomoj.

--Tio ne estas problemo. En mia ĝardeno estas multe da pomarboj. La pomoj ĝuste maturiĝas. Mi farigos el ili al vi grandan torton.

--Bonege, sed altestimata reĝa bopatro mia, permesu al mi, ke mi elektu el kiuj estos farita la torto.

La reĝo ne komprenis la peton de la hometo, sed li konsentis.

Ili iris al la ĝardeno, kaj la hometo komencis elektadi el la pomoj. Kun ili estis ankaŭ la reĝidino.

Post longa serĉado la hometo demandis sian fianĉinon:

--Kara mia, en kiu pomo estu nia estonta lando? Sciu, mi estas pomoprince, kaj kiun vi elektos, en tiu ni loĝos. El la aliaj via patro farigos gigantan torton por nia geedza ceremonio. Mi deziras regali ĉiun malriĉan homon de la mondo.

Kiam li eldiris tiujn ĉi vortojn el la hometo fariĝis belega princo.

--Kio okazis al vi, ke vi aspektis tiom aĉe? – demandis mire la reĝo.

--Mi estis malgranda knabeto, kiam de sorĉisto mi ricevis ruĝan pomon. Li montris al mi, kiom belega mondo kaŝiĝas ene. Ekde tio mi loĝas en pomoj. Tiel mi iĝis pomoprince.

--Kial vi estis tiom malbela? – demandis plu la reĝo.

--Sciu, en la pomoj ofte vivas vermoj kaj mi murdis ilin, kiam venis en mian pomomondon. Ilia patro malbenis min. La malbena daŭris ĝis mi ne trovos fianĉinon. Kiam mi ekvidis vian filineton, mi tuj enamiĝis al ŝi. Mi tuj sciis, ke mi denove estos bela kaj mi saviĝos.

La reĝidino elektis la pomon en kiu ili loĝos, kaj el la aliaj la sukeraĵisto de la reĝo faris grandan pomotorton. Dum la geedza ceremonio ĉiu homo ricevis tiom grandan porcion, ke ili apenaŭ povis manĝi ĝin.

Kiam ili dancis, kantis multe, la juna paro eldiris la sorĉovorton, kaj ili eniĝis en la elektitan, ruĝan pomon kaj ankaŭ nun tie ili vivas feliĉe ĝis la morto.

-Onklo Adalberto-

Belaj fotoj

Belaj fotoj

